

2018-07-25 10 :00

ILEI anoncas

La Ligo havas novan estraron.

Hierau 24-an de julio okazis elektoj dum la komitatkunsido en Madrido okaze de la 51-a ILEI-Kongreso.

Elektighis

Prezidanto Mireille Grosjean

Sekretario Elena Nadikova

Kasisto William Harris

Plie elektighis en la estraro

Karine Arakeljan, nova

Ivan Colling

Yuro Jung, « Unika », nova.

Radojica Petrovic

La jarraporto pri 2018 kaj la financa raporto pri la sama jaro estis aprobitaj.

La bugheto por 2019 estis aprobita.

Kreighis laborgrupo por esplori pri la merkataka aspekto de niaj du revuoj Internacia Pedagogia Revuo (IPR) kaj Juna Amiko (JA). Ghi konsistas el nia kasisto William Harris, Karine Arakeljan, Didier Janot kaj niaj du redaktoroj, Jozefo Nemeth (IPR) kaj Stano Marcek (JA). Fakto estas, ke la eldono de niaj du revuoj, kune kun defcito de kongresoj, kausas defciton por la Ligo. Do la laborgrupo devos esplori pri solvoj.

La surlokaj membroj de la nova Estraro jam kunvenis marde posttagmeze dum unu horo, kune kun Karina Oliveira, kiu pretas labori por ILEI lau siaj kapabloj kaj ebloj. Organizaj aspektoj de la laboro de ekzekutivo estis prezentitaj fare de la prezidanto.

Okazis ekzamenoj, provlecioj, por du kandidatoj de EO-Instruista Trejnado (EIT) sub la gvidado de D-ino Katalin Kovats.

Marde vespere okazis bela koncerto de la duopo KAJTO.

Hodiau merkrede estas ekskursita tago.

Raportas Mireille Grosjean